

**ESPERANTO**  
**(bere dr. Simona Klemenčič)**

**Hans Christian Andersen, *La novaj vestoj de la reĝo* (v esperanto prevedel Lazar Ludvik Zamenhof)**

Antaŭ multaj jaroj vivis unu reĝo, kiu tiel amis belajn novajn vestojn, ke li elspezadis sian tutan monon, por nur esti ĉiam bele ornamita. Li ne zorgadis pri siaj soldatoj, nek pri teatro kaj ĉaso, esceptinte nur se ili donadis al li okazon montri siajn novajn vestojn. Por ĉiu horo de la tago li havis apartan surtuton, kaj kiel pri ĉiu alia reĝo oni ordinaro diras: “li estas en la konsilanejo”, oni tie ĉi ĉiam diradis: “la reĝo estas en la vestejo”.

En la granda urbo, en kiu li loĝis, estis tre gaje; ĉiun tagon tien venadis multaj fremduloj. Unu tagon venis ankaŭ du trompantoj, kiuj diris, ke ili estas teksistoj kaj teksas la plej belan ŝtofon, kiun oni nur povas al si prezenti; ke ne sole la koloroj kaj desegnoj de tiu ĉi ŝtofo estas eksterordinare belaj, sed la vestoj, kiujn oni preparas el tiu ĉi ŝtofo, havas la mirindan econ, ke al ĉiu, kiu ne taŭgas por sia ofico aŭ estas tro malsaĝa, ili restas nevideblaj.

— Tio ĉi estas ja bonegaj vestoj! pensis la reĝo; havante tian surtuton, mi ja povus sciiĝi, kiu en mia regno ne taŭgas por la ofico, kiun li havas; mi povus diferencigi la saĝajn de la malsaĝaj! Jes, la ŝtofo devas tuj esti teksita por mi!

Kaj li donis al la ambaŭ trompantoj grandan sumon da mono antaŭe, por ke ili komencu sian laboron.

Vir: Lazar Ludvik Zamenhof, *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto*. Pariz: Hachette 1903.

## **Hans Christian Andersen, *Kraljeva nova oblačila***

Pred mnogimi leti je živel kralj, ki je imel tako rad lepa nova oblačila da je zapravil ves svoj denar, da je le lahko bil vedno lepo odet. Ni se brigal za svoje vojake niti za gledališče niti za lov, razen če so mu ti dali priložnost, da je pokazal svoja nova oblačila. Za vsako uro dneva je imel posebno opravo, in tako kot o vsakem drugem kralju po navadi rečemo »je v sprejemnici«, so zanj vedno govorili: »kralj je v oblačilnici«.

V velikem mestu, v katerem je živel, je bilo zelo veselo; vsak dan so prihajali mnogi tujci. Nekega dne sta prišla tudi dva goljufa, ki sta rekla, da sta tkalca in da tketa najlepše blago, ki si ga kdo le lahko predstavlja; ne samo, da so barve in vzorci nenavadno lepi, ampak imajo oblačila, ki so narejena iz tega blaga, čudežno lastnost, da so za vsakogar, ki ni vreden svoje funkcije, nevidna.

»To so čudovita oblačila!« je mislil kralj; s takšno opravo, bi lahko ugotovil, kdo v mojem kraljestvu ni primeren za položaj, ki ga ima; lahko bi razlikoval pametne od neumnih! Da, blago mi morajo stkati takoj!

In goljufoma je dal veliko vsoto denarja vnaprej, da bosta začela s svojim delom.

Prevedla Simona Klemenčič.